# *AMLO: dialogo kaj ne konfronti?o por solvi la migran temon.*




Meksikurbo, 31 maj (RHK) La prezidento de Meksiko, Andrés Manuel López Obrador (AMLO), proponis al sia usona kolego Donald Trump la vojon de dialogo kaj ne konfronti?o por solvi la migran temon.

Trump anoncis ke ekde la 10-a de junio li trudos dogan-tarifon je 5% al ?iuj meksikaj produktoj importotaj de Usono se Meksiko ne solvas la amasan migradon, speciale de centramerikanoj, kiuj alvenis al usona teritorio dum la lastaj monatoj.

Responde, AMLO sendis leteron al la usona ?tatestro  per tuit-mesa?o  titolita “Al la prezidento Donald Trump en paca tono” per kiu invitas lin dialogi kaj agi “kun prudento kaj respondeco”.

López Obrador memorigas al Trump ke de la komenco, pasintdecembre, li proponis “agi per kunlaboro por evoluigo kaj helpi la centramerikajn landojn kun produktivaj investoj por krei laborlokojn kaj el la fundo solvi tiun ?i hontindan temon”.

La vicsekretario de eksteraj rilatoj de Meksiko, Jesús Seade, asertis ke se la usona registaro plenumas la minacon altrudi dogan-tarifojn al Meksiko, la registaro de AMLO energie respondos.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/192188-amlo-dialogo-kaj-ne-konfrontigo-por-solvi-la-migran-temon

**Radio Habana Cuba**